# *La ?tata konsilantaro revuas la kuban ekonomion.*



La lastan kunsidon de la ?tata konsilantaro de Kubo, prezidita de Raúl Castro, pritraktis esencajn temojn de la insula ekonomio kiel la kooperativoj, pagosistemoj, koruptado kaj banka sistemo.

En la kunsido, Raúl Castro reemfazis sian alvokon diskuti ?is fundo ?iun donitan pa?on kaj analizi ?ion faritan por determini la eblajn erarojn faritajn kaj ilin korekti, specife pri la funkciado de la ne agrikulturaj kooperativoj, raportas la gazeto Granma.

Li aldonis ke temas pri homa agado, tio estas, ke la ellaborado de propono, la aprobado, la gvidantoj, “ne ?iam ekzistas la necesa sperto por entrepreni tiun ?i taskaron, kaj pro tio nia agado devas esti konstante analizata kritike kaj konstrue”

Raúl aldonis ke la kooperativoj estas eksperimento kiu evoluas, sed en ties aplikado oni ne nepre devas hasti, ni devas adapti?i al la okaza?oj.

Sekve la ministro pri ekonomio, Marino Murillo, estro de la konstanta komisiono por starigo kaj evoluigo, prezentis la raporton pri la agado de la kooperativoj ?is la fino de 2014, kie oni inkluzivis pozitivajn kaj negativajn aspektojn, samkiel la proponoj por solidigi la rolon de la kooperativoj en la insula ekonomio.

?is nun estis aprobita la kreado de 498 kooperativoj, el kiuij 347 jam funkcias. La 88% de tiuj kooperativoj koncentri?as en tri sektoroj, nome, komerco, gastronomio kaj teknikaj kaj personaj servoj,  tio estas, 59%.

En la sektoroj de konstruado (19%) kaj industrio (10%). Pli ol 70% situas en Havano, Artemisa kaj Matanzas, tio estas en la okcidento de la insulo. Nuntempe oni analizas aliajn 205 proponojn.

Murillo emfazis ke la kooperativoj estas laborfontoj kiuj altigis la ofertojn, la kvaliton de la produktadoj kaj servoj, kaj samtempe ampleksigis la horarojn por siaj servoj.Aldone, li konfirmis ke ili atentas la segmentojn de la merkato en kiuj la ?tataj entreprenoj ne estas konkurencaj.

Dum la pasinta jaro, 268 kooperativoj, ?is la fino de novembro, alportis 87 milionojn 727 mil pesoj pro koncepto de impostoj super la vendoj kaj profitoj, samkiel la kontribuis al la socia sekureco. La pritakso de la nacia oficejo de imposta administrado, regas fiska disciplino en la agado de la kooperativoj.

Parolante pri la negativaj aspektoj, la ministro konsideris ke la proceduro por konsistigi la kooperativojn enhavas tro da burokrata ?ar?o kiu kreas malfruojn kaj disigon.

Konsekvence, la ministra konsilantaro aprobis kelkajn proponojn por fortigi kaj plibonigi la  laboron. Oni decidis etendigi la eksperimenton de la kooperativoj de unua grado  sub la principo ratifita de la prezidento,  “ne amasigi la kreadon de kooperativoj, tiel ke la prioritato estas solidigi la ekzistantajn kaj avanci iom post iom, por ne ?eneraligi la problemojn kiuj ekestas”

La ministro prezentis la rezultojn de la apliko de la rezolucio 17 de 2014 pri formoj kaj sistemoj de pago, kiu kontribuis potencigi la ?tatan entreprenon socialistan kiel la ?efa formo de la kuba ekonomio.

La laboragendo de la kunsido inkluzivis la aprobon pri plibonigo de la banka sistemo, kies ekfunkciigo precizigis Leonardo Andollo Valdés, dua estro de la komisiono, kiu esprimis ke ?i “ebligos al la lando posedis sistemon pli efikan kaj kapablan respondi al la nova modelo de ekonomia mastrumado”.

Andollo Valdés informis ke oni “kreos sistemon de pago a?tomatigita, sekura kaj efika, surbaze de le?oj, reguloj kaj proceduroj, kiuj regos en la mekanismoj de pagoj”.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/57824-la-stata-konsilantaro-revuas-la-kuban-ekonomion

**Radio Habana Cuba**